

Theodor Storm,  
Oktoberlied

Der Nebel steigt, es fällt das Laub;  
Schenk ein den Wein, den holden!  
Wir wollen uns den grauen Tag  
Vergolden, ja vergolden!

Und geht es draußen noch so toll,  
Unchristlich oder christlich,  
Ist doch die Welt, die schöne Welt,  
So gänzlich unverwüstlich!

Und wimmert auch einmal das Herz, -  
Stoß an und laß es klingen!  
Wir wissen's doch, ein rechtes Herz  
Ist gar nicht umzubringen.

Der Nebel steigt, es fällt das Laub;  
Schenk ein den Wein, den holden!  
Wir wollen uns den grauen Tag  
Vergolden, ja vergolden!

Wohl ist es Herbst; doch warte nur,  
Doch warte nur ein Weilchen!  
Der Frühling kommt, der Himmel lacht,  
Es steht die Welt in Veilchen.

...

---

<sup>2</sup>aŭ eble:  
Atendu nur momenton!  
La suno ridos, la printemp'

Theodor Storm,  
Oktobra kanto  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Nebulas, falas foliar';  
La glason vi plenigu!  
La grizan tagon ni al ni  
Per vino pliheligu!

Se furiozas ĉio ĉi  
Ekstere en la mondo,  
Ne estas detrubla ja,  
La bela tera rondo!

Se tremas ankaŭ via kor',  
La glasojn vi tintigu!  
La ŝtormo ekster nia dom'  
Min ne malkuraĝigu!

Nebulas, falas foliar';  
La glason vi plenigu!  
La grizan tagon ni al ni  
Per vino pliheligu!

Aŭtuno regas ĉie, sed  
Atendu nur tempeton!<sup>2</sup>  
La suno ridos, la printemp'  
Kreskigos ja floreton.

Theodor Storm,  
Oktobra lido  
*tradukita de Richard Schulz*

Folioj falas en nebul'.  
Ni vinon nun gustumu!  
La grizan tagon kune ni  
Orumu, ja orumu!

Kaj turbulentas la veter'  
Kristane aŭ pagane,  
La Tero estas ja la Ter':  
La vento bruas vane.

Kaj plendas iam ajn la kor', -  
Tintigu ni la glasojn!  
Ni scias ja, bravega kor'  
Ne timas embarasojn.

Folioj falas en nebul'.  
Ni vinon nun gustumu!  
La grizan tagon kune ni  
Orumu, ja orumu!

Aŭtunas, sed atendu nur,  
Atendu iomete!  
Printemp', violoj kaj ĉiel'  
Ridados ĉiuj vete.

...

Die blauen Tage brechen an,  
Und ehe sie verfließen,  
Wir wollen sie, mein wackrer Freund,  
Genießen, ja genießen!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04).*

Arg-174-349 (2004-02-22 17:51:32)

La bluaj tagoj ekas nun,  
Ni volas ilin ĝui;  
La tempo fluas, vane ni  
Ne lasu ĝin forflui!

*Traduko de la Germana poemo “Oktoberlied” de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

Arg-174-351 (2004-02-22 17:52:01)

Ebriaj tagoj ekas nun.  
Ne volas ni enui.  
Ni volas ilin, kara ul’,  
Elĝui, ja elĝui.

*Traduko de la Germana poemo “Oktoberlied” de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-174-352 (2013-02-26 15:14:48)

*La traduko estas - kun permeso de la eldoninto, sinjoro Hermann Behrmann, prenita el la libro “La muzino” de Rikardp Ŝulco (Richard Schulz), eldonita de la Esperanto-Centro Paderborn, Germanujo, en 1992. Ĝi troviĝas ankaŭ en la numero 6/1984 de la GEA-organo “Esperanto aktuell”. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*